

Informilo de Novembro 2019

Numero 43, novembro 2019

UEA funebras la forpason de Ludoviko Zaleski-Zamenhof

Sola vivanta nepo de la kreinto de Esperanto, Louis-Christophe (Ludoviko Kristoforo) ZALESKI-ZAMENHOF (naskiĝis la 23-an de januaro 1925 en Varsovio, mortis la 9-an de oktobro 2019 en Parizo) estis doktoro inĝeniero pri surlanda kaj enmara konstruado, aparte pri premŝtalbetono, nepo de L. L. Zamenhof. Li estis filo de Adam Zamenhof kaj Wanda Zamenhof, naskita Frenkiel; la personan nomon li ricevis honore al sia avo, Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Li estis Honora Membro de UEA kaj konata personeco en Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Li studis en Varsovia Politekniko 1946-49 kaj diplomiĝis kiel inĝeniero pri konstruado, sekve doktoriĝis pri teknologio de streĉbetono. En 1959 li translokiĝis al Parizo kaj daŭrigis sian profesian karieron en Francio kaj aliaj landoj, realigante konstruaĵojn sur tero kaj maroj. Lia alia kampo de laboro estis didaktiko en la Arkitektura Altlernejo en Parizo kaj Politekniko de Milano. Li publikigis multajn artikolojn kaj librojn pri sia fako. Post la emeritiĝo en 1993 li okupiĝis pri faka konsultado, ĉeestis sciencajn konferencojn kaj kongresojn, inkluzive de Esperanto-kongresoj. Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof havis du filinojn: Hanna (1953) kaj Margaret (1958) kaj du genepojn: Klementina Zamenhof-Zaruski kaj Pierre-Louis-Antoine Lebard.

Li loĝis en Parizo kun la edzino Juliette, naskita Sekrecka. Li parolis la francan, anglan kaj Esperanton, sed hejme la polan. Li havis la francan kaj polan civitanecojn, estis honora civitano de Bjalistoko.

En 1934 Ludoviko esprimis la deziron partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo. Liaj gepatroj asertis, ke partopreni en Esperanta kongreso, sen koni tiun ĉi lingvon mistrasigas la celon. La filo helpata de siaj onkloj Zofia Zamenhof kaj Lidia Zamenhof entuziasme eklernis kaj ekposedis flue la lingvon internacian. Tiel komenciĝis lia nova rolo de la „eta princo” dum laŭvicaj Esperantaj kongresoj. Li iĝis objekto de interesiĝo por la kongresanaro: en Stokholmo – 1934, en Romo – 1935, en Vieno – 1936 kaj en Varsovio – 1937, kie li nome de la familio Zamenhof, salutis la kongresanojn. Septembre 1939 la germanaj aviadiloj bombardis Varsovion. La domo ĉe la Królewska-strato 41, en kiu loĝis la familio Zamenhof, estis komplete detruita. Tiam Ludoviko estis nur 14-jara knabo.

En 1987 Varsovio, kiel „lulilo de Esperanto”, estis ĝusta loko por celebri la centjaran jubileon de la lingvo internacia. La 72-a Universala Kongreso de Esperanto en la ĉefurbo de Pollando evidentiĝis la plej granda en la historio de la movado. Ĝi allogis 6 mil partoprenantojn, sen kalkuli proksimume unu milon da gastoj, kiuj alvenis sen la formala aliĝo el Sovet-Unio kaj el aliaj t.n. socialismaj landoj. La direktoro de UEA, Simo Milojević, sukcesis retrovi en diversaj landoj de la mondo sep membrojn de la Zamenhofa familio, kiuj alvenis kiel honoraj gastoj, inter ili Louis Christophe Zaleski-Zamenhof kun la edzino Juliette. Li, kiel la nepo de la kreinto de Esperanto, varsoviano kaj monde renoma konstruisto de „artefaritaj insuloj” sur maroj kaj oceanoj, montriĝis aparta atrakcio por ĵurnalistoj, sed ankaŭ por la kongresanoj.

Louis C. Zaleski-Zamenhof, reaperinte en la movado post dudekjara paŭzo, jam firme restis en ĝi. Li engaĝiĝis en la popularigon de la lingvo internacia kaj ĝia ideo per siaj intervjuoj por amaskomunikiloj. Li ankaŭ renkontiĝadis kun esperantistoj, kion respegulas la filmo aperinta en la Pola Televido s.t. „Śladami Dziadka” (Spuroj de la Avo). En ĝi la nepo estas montrita en kelkaj lokoj, ligitaj kun lia avo Ludoviko.

Bjalistoko iĝis ofta vizitcelo de L.C. Zaleski-Zamenhof. En la jaro 2000 li akceptis simbolan diplomon pro la fakto, ke lia avo Ludoviko Zamenhof gajnis la unuan lokon en la plebiscito por „Bjalistokano de la 20-a jarcento”. En la jaro 2007 li estis nomita honora urbano de Bjalistoko apud 14 aliaj distingitoj, inkluzive de Józef Piłsudski kaj Lech Wałęsa. Li plurfoje vizitis Bjalistokon kiel membro de la Fondumo Zamenhof respondeca pri la konstruo de Zamenhof-Centro.

Pli da informoj legu en la teksto de Roman Dobrzyński, aperigita en Vikipedio https://eo.wikipedia.org/wiki/Louis-Christophe_Zaleski-Zamenhof

Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio por la Tago de Unuiĝintaj Nacioj, 24 oktobro 2019

Okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj 2019, la mondo frontas defiojn daŭre kreskantajn – ekde la klimata krizo ĝis la daŭra kaj eĉ intensiĝanta malpaco en multaj mondopartoj. Kaj Unuiĝintaj Nacioj mem estas minacata de financa krizo kaŭzita de la rezisto de multaj membraj ŝtatoj al ĝustatempa kaj plena pagado de siaj porcioj de la kostoj.

Se iam estis tempo kiam la popoloj de la tuta mondo alpaŝu Unuiĝintajn Naciojn por esprimi sian apogon, tiu tempo estas hodiaŭ.

Jam de la komenco de Unuiĝintaj Nacioj, nia Asocio, la Universala Esperanto-Asocio, ĉiam subtenis ĝiajn celojn kaj idealojn. Jam de la jaro 1954, do de 65 jaroj, nia Asocio ĝuas konsultajn rilatojn kun UNESKO; kaj jam de la jaro 1950 ni komencis dialogon kun Unuiĝintaj Nacioj kiu poste kondukis al formalaj rilatoj kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio. Ni senlace laboras inter niaj membroj, kaj la membroj senlace laboras inter la publiko en pli ol cent landoj, por disvastigi informojn pri UN kaj trovi kampojn kie ni povas kune labori. La klopodo vivteni kaj funkciigi la sistemon de UN havas la saman idean bazon kiel nia klopodo disvastigi Esperanton, nome krei harmonian, pacan kaj egalecan rilaton inter ĉiuj homoj, de ĉiuj sociaj fonoj, cele al vera kaj kompleta interkompreniĝo.

Ni promesas, ke ni restos plene dediĉitaj al Unuiĝintaj Nacioj kaj daŭros aktive laboradi por konsciigi homojn pri la graveco de toleremo, diverseco kaj solidaro kiel vojoj por teni pacan kaj por kontribui al vere libera kaj emancipita socio, kie regu amikeco kaj respekto inter ĉiuj homoj kaj popoloj.

Ni taksas esenca la rilatadon de UN kun instancoj de la civila socio, ĉar grupoj de la civila socio kapablas rekte rilati kun homoj kaj tiel efektive disvastigi la valorojn de UN. Ni konscias, ke UN ne kapablas atingi siajn altajn celojn nek plenumi siajn specifajn programojn sen la aktiva kunlaboro de ni ĉiuj en spirito de egaleco kaj reciproka respekto.

En la jaro 2020, nia Universala Kongreso de Esperanto (Montrealo, Kanado, 1-8 aŭgusto) estos aparte dediĉita al festado de la 75-jara jubileo de Unuiĝintaj Nacioj. Ni alvokas al nia membraro kaj al ĉiuj Esperanto-asocioj kunlabori por ankoraŭ pli vaste informadi pri UN kaj ĝia graveco por la monda paco, kaj aliĝi al ĝiaj programoj kaj iniciatoj kiam kaj kie eble, ekzemple pere de naciaj UN-Asocioj. Ni petas, ke

ili venu amase al Montrealo por kunfesti la atingojn de UN, kaj ke jam ili disvastigu tiun ĉi mesaĝon en la propraj medioj kaj inter la publiko.

Alvoko al lingva diverseco en la Civilsocio Konferenco de UN

“Ĉu sufiĉas la angla? Aŭskulti la multajn voĉojn de la mondo” estis la temo de ‘ateliero’ akceptita por prezento en la Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Civila Socio, kiu okazis en Salt Lake City (Sallagurbo), Usono, de 26 ĝis 28 aŭgusto. La atelieron gvidis la nove elektita prezidanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) Duncan Charters. Parolis ankaŭ estrarano de Esperantic Studies Foundation Anna Bennett, reprezentantoj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) Hans Becklin kaj Marcus Griep, kaj la reprezentanto de UEA ĉe Unesko Renée Triolle.

Fundamenta al la diskuto estis la fakto, ke tro ofte la internacia komunikado donas avantaĝon al parolantoj de la angla lingvo kaj malavantaĝas tiujn de aliaj lingvoj. La prezentantoj emfazis pli fortan konsciiĝon pri la bezono de dudirekta komunikado sen lingva diskriminacio – afero aparte urĝa en la partnerado inter UN kaj la civila socio por atingi la deksep Celojn por Daŭripova Evoluigo de UN. Parolantoj notis ankaŭ, ke la jaro 2019 estas la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj – memorigo, ke ĉies voĉoj estu aŭdataj kaj komprenataj fare de la lingva elito.

UEA havas oficialajn konsultajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko. Kvankam la ateliero okazis samtempe kun dudeko de aliaj atelieroj, la partopreno de la publiko estis bona: dudekkvino da homoj ĉeestis, el kiuj la plimulto faris demandojn aŭ restis poste por paroli kun la kontribuintoj.

La sola oficiala lingvo de la Civilsocio Konferenco estis la angla – malgraŭ tio ke grandaj nombroj de konferencanoj havis nur limigitan kapablon en la angla. Tiun punkton oni aparte emfazis en la diskuto kiu sekvis la formalajn paroladojn. Se UN vere volas elimini diskriminacion, asertis unu partopreninto, eble indus, ke ĝi laboru pli forte por redukti maljustan diskriminacion surbaze de lingvoj.

S-ino Triolle, denaska francparolanto, prezentis siajn rimarkojn en Esperanto – lingvo kiu celas (kiel ŝi mem rimarkigis) garantii dudirektan, demokratian komunikadon. Interpretis ŝiajn rimarkojn d-ro Charters.

Finance subtenis la sesion Esperantic Studies Foundation.

Mesaĝo al la esperantistaro por la Internacia Tago de Paco, 21 septembro 2019

Ĉiujare, tra la tuta mondo, oni festas la Internacian Tagon de Paco.

La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj deklaris la 21-an de septembro tago dediĉita al plifortigo de la idealoj de paco ene de, kaj inter, ĉiuj nacioj kaj popoloj.

La membroj de UN akceptis la 17 Celojn por Daŭripova Evoluigo en 2015 ĉar ili komprenis, ke ne eblas konstrui pacan mondon se oni ne ekpaŝos por atingi ekonomian kaj socian evoluigon de ĉiuj homoj ĉiuloke, kaj certigi la protekton de iliaj rajtoj. La 17 Celoj tuŝas larĝan gamon de demandoj, inkluzive de malriĉo, malsato, sano, edukado, klimato, seksa egaleco, akvo, higieno, energio, la natura medio kaj socia justeco.

La 13-a Celo por Daŭripova Evoluigo, “Agado pri Klimato”, alvokas al tuja agado por malaltigi varmigajn emisiojn, kreskigi klimatan ŝanĝoreziston, kaj plibonigi klerigon pri klimata ŝanĝiĝo.

“Klimata Agado por Paco” estos do la temo de la ĉi-jara Internacia Tago de Paco.

La temo atentigas pri la graveco kontraŭstari klimatsanĝiĝon por protekti kaj disvastigi pacan tra la mondo. Klimatsanĝiĝo pligrandigas minacojn kontraŭ internaciaj paco kaj sekureco. Naturaj katastrofoj dislokas trioble pli da homoj ol dislokas militaj konfliktoj. La saligo de akvo kaj rikoltoj endanĝerigas nutraĵan sekurecon, kaj ties negativa efiko je publika sano daŭre altiĝas. Kreskantaj streĉitecoj pri naturaj rimedoj kaj pro amasa moviĝo de homoj evidentas ĉiulande en ĉiu kontinento.

Paco estos atingebla nur se okazos konkreta agado por kontraŭbatali klimatsanĝiĝon. La 23-an de septembro, Unuiĝintaj Nacioj kunvenigos Pintkonferencon pri Klimata Agado, kun konkretaj kaj realismaj planoj por pli rapida agado al plenumo de la Pariza Interkonsento pri Klimatsanĝiĝo.

La Esperanto-movado, per sia tutmonda reto de komunikado, povas ludi signifan rolon en la pozitiva agado por paco kaj klimato. Ni alvokas al esperantistoj ĉie en la mondo dediĉi sian atenton, okaze de la Internacia Tago de Paco, al tiu ĉi esenca demando. Sendu viajn ideojn, kaj raportu pri via agado, pere de #PeaceDay kaj #ClimateAction – kaj al info@esperantoporun.org.

Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de Ne-perforto 2019

Ĉiujare, Unuiĝintaj Nacioj festas la 2-an de oktobro kiel Internacian Tagon de Ne-perforto – tagon kiam ni laŭdas la potencon de pacaj ideoj por movi la homaron al la bono. En tiu tago en 1869 (antaŭ ĝuste 150 jaroj), naskiĝis la granda pioniro de la filozofio kaj strategio de ne-perforto, Mahatma Gandhi.

Mahatma Gandhi nomis ne-perforton “la plej granda potenco je la dispono de la homaro” kaj Martin Luther King priskribis ne-perfortan reziston “kuraĝa konfrontiĝo de malbono per la potenco de la amo.”

Universala Esperanto-Asocio aparte emfazas la potencon de lingva komunikado kiel instrumento de ne-perforto. Per parolo kaj skribo, la homo povas persvadi, insisti, rezoni – sen turniĝi al perforta konfrontiĝo. Sed tio eblas nur tiam kiam ambaŭ flankoj parolas la saman lingvon. Tro ofte, la komunikado kolapsas pro malsameco de lingvoj, aŭ pro la nekapablo de parolantoj de malsamaj lingvoj adekvate transponi tiujn diferencojn. Kaj tro ofte, kiam homoj ĉesas kompreni, ili komencas batali.

Mahatma Gandhi komprenis tiujn fundamentajn verojn. Li proponis la alproprigon de Esperanto kiel ilo de interkomunikado “por ĉiuj popoloj” kaj kune laboris kun unu el la unuaj prezidantoj de Universala Esperanto-Asocio, la svisa diplomato kaj klerulo Edmond Privat.

La Internacia Lingvo Esperanto estis kreita por transponti la diferencojn inter lingvoj, formante bazon por ne-perforta komunikado kaj la antaŭenigo de interkompreniĝo. La statuto de Universala Esperanto-Asocio asertas, ke “bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj, tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj.” Surbaze de tiu statuta postulo, la Asocio nete kondamnas ĉiun specon de perforto.

“Gandhi konstante substrekis la fendon inter tio kion ni faras kaj tio kion ni kapablas fari,” lastatempe rimarkis la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj António Guterres. “Mi alvokas al ni ĉiuj, ke ni faru ĉion kion ni povas fari por transponti tiun breĉon per strebado konstrui pli bonan estontecon por ĉiuj homoj.”

Okaze de la Internacia Tago de Ne-perforto, Universala Esperanto-Asocio ree konfirmas sian kunlaboron kun Unuiĝintaj Nacioj por krei pli pacan kaj pli kompreneman mondon laŭ la spirito de Mahatma Gandhi kaj la ne-perforto kiun li adoptis.

Universala Kongreso de Esperanto, aŭgusto 2020

La 105-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Montrealo de 1 ĝis 8 aŭgusto, 2020, sub la temo “UN 75-jaraĝa: dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝanta mondo.” Ĝi celas emfazi la kontribuon de Unuiĝintaj Nacioj al paco kaj kompreniĝo depost sia fondiĝo. La ĉiujara Esperantologia Konferenco okazos en la kadro de la Kongreso, kaj Nitobe-simpozio, organizita de ESF, kunvenos tuj post la kongreso.

UEA invitas prelegi en la 73-a IKU-sesio en Montrealo. Kadre de la 105-a UK en Montrealo okazos la 73-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas profesorojn, docentojn kaj personojn kun similaj kvalifikoj sendi proponojn pri prelegoj al la sekretario de IKU (amri@huji.ac.il). La proponoj alvenu plej laste la 15-an de Januaro 2020. Lige kun la IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Kandidatoj por IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistas el unu prelego kadre de la IKU kaj el du kromaj prelegoj. Tiukaze bonvolu indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio,

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017

[1] 212-687-7041

www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041